# INFORMA
# bulteno
## DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

APRILO - JUNIO 1964 Numero 5 /67/




UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN KOPENHAGO 1962.

Salonego plenplena de homoj. S-ano Holmes transdonas presidantan marteleton al nova prezidanto de UEA - al s-ano profesoro doktoro HIDEO YAGI. Laĉestantoj aplaŭdas kaj ni gratulas al li. Ne pasas du jaroj kaj el malproksima Japanujo venas doloriga sciigo, ke samideano, kiu sperte gvidis nian movadon jam ne plu vivas. Tiam, en Kopenhago, mi ne antaŭsentis profundan sagecon de japanaj - Versoj skribitaj je akvo. Ĉu ne estas en ĉiu renkontiĝo komenco de disiro, sinjoro? Vin ni ne forgesos. Soňa Hodková

## EL NIA REDAKCIO

KION NI CELAS?

En la ĉefa artikolo de la 15-a numero de «Informoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato» /CSEK/, kiu raportas pri la pasintjara laboro de CSEK kaj pri la nuntempa situacio de E-movado en Ĉeĥoslovakio, ni legis krom alie, ke nia =I.B.= kaj la Esperanto-Agado- /Martin-Jihlava/ estas la plej gravaj E-bultenoj eldonataj en Ĉeĥoslovakio. Por tiu ĉi aprobo ni povus esti al la aŭtoro de tiu artikolo dankemaj, sed kiel nia Klubo, tiel nia redakcio estas konvinkitaj, ke tio, kion ni ĝis hodiaŭ faris, ne povas sufiĉi. Ni ne volas en nia artikolo skribi pri multaj malfacilaĵoj, kiujn nia redakcio havas, sed ni volas informi niajn legantojn pri la situacio, kiu estis antaŭ unu jaro kaj kiu estas hodiaŭ, kaj finfine kien ni celas.

Antaŭ unu jaro ni staris antaŭ demandoj ĉu ni eldonadu =I.B.= limigitan nur por klubaj celoj au ĉu ĝi servu kiel informilo eĉ por aliaj ĉeĥoslovakaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Ni supozas, ke la kluba laborkomitato elektia ĝustan vojon, kvankam ĝi ne estas facila kaj senproblema.

=I.B.= ne intencas fariĝi iu centra presorgano de ĉeĥoslovaka E-movado, tamen ĝi volas ĉiam informi ĉiun leganton pri aktualaĵoj kaj interesaĵoj plej variaj. =I.B.= volas ankaŭ helpi al esperantistoj, kiuj intencas viziti Ĉeĥoslovakion. En ĉiu numero aperos artikolo priskribonta ion interesan el Ĉeĥoslovakio.

Same nia Klubo. Ĝi organizis je la sama celo por la membraro du instruktaĵojn, dum kiuj sperta instruisto rekomendis al ni krom alie plej bonajn vojdirektojn tra Praha. Nun povas niaj membroj gvidi eksterlandajn gastojn tra Praha kaj klarigi al ili kaj samtempe montri la plej interesajn vidindaĵojn.

Kaj tiu vizitonto, kiu havas specialan deziron, skribu al ni, unuopuloj kaj karavanoj sciigu al ni, kiam vi venos kaj ni helpos al vi prepari belan programon.
Kaj kiam vi poste revenos hejmen, skribu al ni, kio plaĉis aŭ kio ne plaĉis al vi. Viaj leteroj montros al ni ĉu nia klopodo estis utila kaj ili ankaŭ dokumento, ke Esperanto ne estas hobio, sed ke ĝi estas ĉiuflanke utila.

Tiu ĉi laboro, helpanta al pligrandigo de turismo, estas nia ĉefa ĉi-jara celo, sed kompreneble ĝi ne estas nur unusola. Aŭtune ni aranĝos E-kursojn en kunlaboro kun Distrikta Kultura Domo. La klubaj programoj estos pli riĉaj kaj en oportuna tempo ni aranĝos ekspozioion de esperanta kaj tradukita literaturoj. Post plenumo de tiuj ĉi taskoj ni celos al aliaj. Sed tio ĉi dependos de bona volo kaj kunlaboro de niaj membroj. Nur tiam ni sukcesos!

-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

NOVA ELDONO
DE ESP. VORTARO DE R. HROMADA
En mezo de junio 1964 aperis dua eldono de ESPERANTA-ĈEĤA kaj CEĤA-ESPERANTA POŜVORTARO de R. Hromada. Ĝin eldonis Ŝtata pedagogia eldonejo en kvanto 14.500 ekzempleroj. La vortaro estas bindita, havas lakitan kovrilon kaj 392 paĝojn.
Ni varme rekomendas tiun ĉi poŝvortaron al ĉiu, kiu komencas lerni Esperanton kaj ĝi estos utila ankaŭ al progresintoj.
La vortaro estas aĉetebla en vendejoj de nacia entrepreno KNIHA po Kčs 8,50.

-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

NI ATENTIGAS,
ke nia Klubo havas je dispono sufiĉan kvanton da ESPERANTA GRAMATIKO de T.Pumpr, kiun eldonis Ŝtata pedagogia eldonejo kiel kromkopiaĵo de Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta poŝvortaro de R. Hromada.

La broŝureto havas 38 paĝojn, sur kiuj estas koncize priskribitaj partoj de Esp. gramatiko. Ĝi estas bona helpilo por ĉiu esperantisto.

Interesuloj, petu ĝin ĉe Esperantista klubo en Praha. Ĝia prezo estas 2,- Kčs.

-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

# Ĉeĥa nacia teatro vizitos Anglujon

Pri jubilanta Nacia teatro en Praha ni skribis en la pasinta numero de «I.B.». Via artikolo havis eĥon, tial nia redaktoro s-ano Pražák vizitis direktoron de Nacia teatro en Praha s-ron Bedřich Prokoš kaj en la nomo de niaj legantoj donis al li kelkajn demandojn.

Ĉi-jare preparas Nacia teatro en Praha grandan artistan vojaĝon al Anglujo. Ni petas, estu tiel afabla kaj diru ion al niaj legantoj pri via vojaĝo.

"Nacia teatro en Praha estis ĉi-jare la unuan fojon invitita partopreni Edinburgan Internacian Festivalon. Ĝi komencos la 15-an de aŭgusto kaj daŭros ĝis la 5-a de septembro. Prezidanto de tiu ĉi signifa opera festivalo, lordo Harewood venis pasintaŭtune en la ĉefurbon Praha por vidi kelkajn niajn famajn operojn. Li tre ekŝatis verkon de Janáček kaj tial li petis

nin, ke ni partoprenu la Edinburgan Festivalon per prezentadoj de Janáček-operoj =KATJA KABANOVÁ= kaj =EL MORTA DOMO=, kaj krome, ke nia orkestro, ĥoro kaj solistoj prezentu sub taktbastono de merita muzikestro J. Krombholc =GLAGOLAN MESON=. Ankaŭ li rekomendis al ni prezenti operojn =DALIBOR= de Smetana, =NAJADO= de Dvořák kaj =REVIVIĜO= de Cikker."

Do, la programo estos riĉa.

"Jes. En Edinburg prezentos operansamblo de Nacia teatro kvin inscenigojn en dekok prezentadoj. Krom tio ni realigos du koncertojn, el kiuj unu havos je programo: =MEMORLIBRO DE MALAPERINTO= de Janáček kaj kantoj de Smetana kaj de Dvořák. En la dua koncerto estos prezentitaj =HARMONIO POR NAŬ BLOVINSTRUMENTOJ= de Kramář, =JUNECO= de Janáček kaj=SERENADO EN C-mol POR BLOVINSTRUMENTOJ= de Mozart."

Kiuj elstaraj ĉefaj artistoj partoprenos la prezentadojn en Anglujo?

"Ĉiuj, kiuj partoprenos la alveturon estas artistoj en sia fako, nome mi pensas pri teknika personaro aŭ pri profesiaj artistoj. Sed vi volas aŭdi nomojn. Do: merita artisto J. Krombholc muzikestros operon =Dalibor= de Smetana, kiun reĝisoros merita artisto V. Kašlik, =Káta Kabanová=, operon de Janáček reĝisoros merita artisto H. Thein kaj operon =Reviviĝo= de Cikker, kiun reĝisoros K. Jernek. Muzikestro B. Gregor kaj reĝisoro L.Stros prezentos operon de Janáček =E1 morta domo=. Operon =Najado= de Dvořák en reĝisorado de merita artisto V. Kašlik, muzikestros J. H. Tichý. En =Glagola meso= de Janáček, kiun preparis merita artisto J. Krombholc, prezentos sin krom nia orkestro kaj ĥoro operaj solistoj de Nacia teatro, nacia artistino M. Krásová, L. Domanínská, nacia artisto B. Blaĥut kaj nacia artisto E. Haken. En =Memorlibro de malaperinto= de Janáček kantos I. Mixová kaj naoia artisto B.Blaĥut, pianakompanataj de J. H. Tichý. Kantojn de Smetana kaj de Dvořák kantos eminentaj operaj solistoj de nia teatro. Muzikestro B. Gregor preparas koncerton de blovinstrumenta grupo de orkestro de Nacia teatro."

La preparlaboroj de tiu ĉi granda alveturo estas certe granda streĉo por ĉiuj, kiuj en Edinburg reprezentos Nacian teatron. Kaj certe eĉ organize estas tio nenia bagatelaĵo.

"Kompreneble. Nian alveturon partoprenos entute 280 membroj kaj laboruloj de Nacia teatro. Ni ĝin intenzive preparas jam multajn monatojn. Verkojn, kiujn ni en Edinburg prezentos, vidis jam kaj vidos publiko en Praha antaŭ nia forvojaĝo. Ekzemple la opero de Janáček =E1 morta domo= havis la unuan prezentadon en Praha la 24-an de aprilo. La unua prezentado de opero =Kátja Kabanová= estos la 3-an de junio. Por nia kultura publiko ni prezentos la 28-an de junio =Glagolan meson= en la katedralo de Sta Vito."

Kaj ni deziras al via alveturo: "Rompu nukon!"

"Mi dankas. Sciu, ĝojas nin, ke operan parton de la ĉi-jara Edinburga Festivalo plenigos nur ĉeĥa opero en prezentado de la unua ĉeĥa ŝtata sceno. Ni esperas, ke ni sukcese plenumos tiun ĉi gravan taskon kaj ke ni gajnos por ĉeĥa muziko, kaj klasika kaj nuntempa, en internacia atmosfero de Edinburga Festivalo novajn amikojn kaj admirantojn."

Jes, eĉ nia deziro tio estas! Sed nun permesu al mi la lastan demandon: Ĉu vi havas iajn spertojn pri Esperanto?

"Mi mem Esperanton ne scipovas sed antaŭ nelonge mi aŭdis kelkajn ariojn el opero =Vendita fiancino= de Smetana kantitajn de membro de Nacia teatro Z. Švehla en esperantlingva traduko de M. Rudolf. Mi estis ege surprizita, ke Esperanto kapablas tian precizan tradukon. Tre plaĉis al mi ĝia kanta ebleco, ege valora por kantisto. Mi opinias, ke Esperanto havas grandajn eblecojn por interŝanĝo de kulturaj riĉaĵoj inter nacioj. Tial tre ĝojas min, ke esperanta redaktoro estis la unua, kiu venis fari intervjuon rilate al nia artista vojaĝo en Anglujon."

Majo 1964

# POSTEULO DE VIKINGOJ EN PRAHA

Plenplena salonego de la Urba biblioteko ea Praha varme bonvenigis, vespere la 19-an de majo, faman norvegan esploriston s-ron Thor HEYERDAHL, aŭtoron de multaj sciencaj kaj popu- larsciencaj libroj. S-ro Heyerdahl rakontis pri sia scienca laboro kaj respondis multajn demandojn al ĉeestintaj legantoj de siaj libroj. Ĉiu volis scii ion pli detalan el liaj plej konataj ekspedicioj priskribitaj en la libroj =EKSPEDICIO KON-TIKI= kaj =AKU-AKU=.

Antaŭ tiu ĉi prelego renkontiĝis s-ro Heyerdahl kun nia prezidanto s-ano Miloš Rudolf. Ili estas longjaraj amikoj ek de la jaro 1954, kiam s-ano Rudolf tradukis el Esperanto lian =Ekspedicion Kon-Tiki= en ĉeĥan lingvon; ili interkorespondadas, sed nur nun en Praha ili renkontiĝis persone. Fine de tiu ĉi renkonto invitis nia prezidanto s-ron Heyerdahl, ke li visitu nian kluban kunvenon. Pro multaj altaj devoj ne povis s-ro Heyerdahl tiun ĉi proponon akcepti, tial li petis pri transdono de amikaj salutoj al niaj geklubanoj.

Thor Heyerdahl jam ne intencas entrepreni grandan ekspedicion. Nuntempe li multe prelegvojaĝas kaj preparas trivoluman sciencan verkon el materialoj, kiujn li kolektis dum siaj esploroj en Suda kaj Meza Amerikoj kaj en Polinezio. La unua volumo jam aperis. Kvankam ŝajnis lia teorio pri migrado de amerikaj Indianoj en Polinezion komence fantazie, la ĝisnunaj rezultoj de liaj kaj de aliaj ekspedicioj jam atestas ĝian logikan ĝustecon.Thor Hayerdahl, batalanta kiel parašutisto en la 2-a mondmilito por liberigo de sia patrujo kontraŭ nazi-okupantoj, aligis al ordenoj soldataj ordenojn sciencajn. El la manoj de norvega reĝo li ĉi-jare ricevis la ordenon de =Vega= / kaj aŭtune, okaze de lia 50-a naskiĝtago, li ricevos en Londono =Oran medalon= de la Reĝa Brita Geografia Asocio.

Thor Heyerdahl riĉigas serion da nomoj de gloraj norvegaj esploristoj kiel estis Nansen, Amundsen kaj aliaj.

Red.

+/ Laŭ la ŝipo =VEGA=, kiu sub E. A. Nordenskjold, kiel la unua ŝipo en la jaroj 1878-79 kapeis tra la nordorienta pasado.

## MESAĜO EL ANGLUJO

Ĉeĥoslovakion vizitis angla karavano, en kiu estis geedzoj Jackson-Laurie el Bournemouth, konataj funkciuloj de E-movado. Ambaŭ gesamideanoj estis gastoj de nia Klubo kaj en plenplena salonego Merkur bonvenigis ilin nia kultura referanto a-ano J. Ondráček. Niaj gastoj prelegis pri sia patrujo kaj precipe pri Bournemouth. Fine de la prelego ii transdonis al ni leteron kaj donacojn, kiujn sendis urbestro de Bournemouth s-ro Herold Alfred Benwell al ĉefurbestro de Praha kun peto, ke niaj reprezentantoj transdonu la leteron kaj la donacojn al la ĉefurbeatro, čar lli mem ne povis fari tion pro manko da tempo.

## AL LA ĈEFURBESTRO DE PRAGUE

Mi, Harold Alfred Benwell,urbestro de Bornemouth, deziras per tiu ĉi letero konatigi al vi gesinjorojn E. W. Jackson-Laurie, du altaj estimataj civitanoj de ĉi tiu urbo, kiuj alportas mesaĝon de sincera bonvolo kaj bontrovo al vi kaj pere de vi al la civitanoj de via urbo.

Ne povas esti ia dubo, ke pere de la interŝanĝo de vizitoj kaj de persona kontakto kun la nacianoj de aliaj landoj tre alttaksa kontribuo estas farata al la lntemacia paoo kaj prospero, aferoj, kiuj devas esti karaj al ĉiuj niaj koroj. Kiel urbestro mi eatas feliĉa, ke reprezentantoj de Bournemouth vizitos Ĉeĥoslovakion.

La ĝentileco, kiun oni montras al la gea-roj Jackson-Laurie, mi konsider-os kvaaŭ personan favoron al mi mem, kaj mi bonvenigos okazon reciproke sam-fari, se iam tia okazo alvenos.

Subskribita kaj sigelita H. A. Benwell
antaŭ la sekretario de la urbestro D. Randall

La 26-an de junio akceptis la ĉefurbestro de Praha reprezentantojn de Esperantista klubo en Praha, sekretarion VI. Pražák kaj kulturan referanton. J.Ondráček, kiuj transdonis cititan leteron kaj la donacojn al la ĉefurbstro, en la nomo de urbestro de konata angla banloko Bournemouth.

En varme arnika interparolado interesiĝis la ĉefurbestro pri E-movado entute kaj specaale en Ĉeĥoslovakio. La ĉefurbestro rememoris, ke jam en la jaro 1924 lia amiko propagandis Espe- ranton. Krome li konstatis, ke Esperanto vere povas esti ligilo ne nur inter esperantistoj, sed inter nacioj, kaj ke ĝi povas servi al internaoia interkompreniĝo, kaj al interŝanĝo de kulturaj, sciencaj kaj teknikaj spertoj. Kiam li ekscis, el mencio pri la 5-a preparata n-ro de »I.B.=, ke nia Klubo informs sian legantaron pri partopreno de Nacia teatro en Praha en Edinburga lnternacia Festivalo, li diris, ke tio estos arta reprezentado ne nur de ĉeĥaj verkistoj, sed eĉ de ĉeĥaj artistoj, kaj ke tio ĉi estos vizitkarto de ĉeĥoslovaka muzikarto.

Fine de la interparolo la ĉefurbestro substrekis la ideon de intemacia interkompreniĝo, de amikeca kaj paca tutmonda kunlaboro.

---

"INFORMA BULTENO" de Esperantista klubo en Praha - fakrondeto ĉe Obvodní kulturní dům ONV 1, Praha 1. Respondeca: Miloš Rudolf. Teknike redakcios VI.Pražák. Lingva redakcio: A. Slanina. Aperas laŭbezone Adreso: "ESPERANTO"“, P.B. 1108, Praha 1, Ĉeĥoslovakio. Ĉiuvendrede de la 20-a ĝia la 22-a horo telefonu: 22 65 14.

**LIBERTEMPU EN ĈEĤOSLOVAKIO !**

E k k o n u  e n  Ĉeĥoslovakio ĝian prahistorion, historion kaj nuntempon
A d m i r u  e n  Ĉeĥoslovakio naturbelecojn, vidindaĵo jn, foXkioron
K o n a t iĝ u  en  Ĉeĥoslovakio
kun kulturaj trezoroj, kun ĉiuflanka progresado de industrio, de sciencoj, de terkulturado ktp.
V i z i t u  e n  Ĉeĥoslovakio mondkonatajn hanlokojn,ekspoziciojn, muzikfestojn
N e  f o r g e s u en Ĉeĥoslovakio viziti Esperantistajn klubojn!
ĈEĤOSLOVAKIO INVITAS VIN!
E k s t e r l a n d a j  i n t e r e s u l o j ! Por informoj skribu nur en Esperanto al: =INFORMA BULTENO= , P.B.1108, Praha l, Ĉeĥoslovakio - A L D O N U  RESPONDKUPONON!